# VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského klubu v Mnichově Hradišti, pro členy a příznivce mezinárodního jazyka.
Odpovědný redaktor: MUDr Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště, Družstevní 1161
Cena: dobrovolný příspěvek
Podávání novinových zásilek povoleno oblastní správou pošt Střední Čechy v Praze, čj.P/Fiš-2295/92 ze dne 16.XI.1992

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx
Numero 3 Julio 1994 Červenec Číslo 3
xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

N i a  a s o c i o travivas malfacilajn tagojn. Multaj gesamideanoj eĉ opinias, ke venis fino de esperantista agado en nia ŝtato. Kvankam ni travivis periodojn de persekutado, vivtenis intersamideanajn rilatojn, ni timas, ĉu nia movado estos ankoraŭ kapabla renaskiĝi. Trairo de Jílská-strato kun malfermita sekretariejo revokas la rememoraĵojn při aktiveco de multaj gesamideanoj, kiuj ofereme helpis konstrui ĉi tiun centron de nia aktiveco kaj pri tiuj, kiuj helpis per multaj horoj de ilia libera tempo por plenumo de aktualaj aktivecoj, dissendo de Strato, helpo dum konstruo de la oficejo, kiuj travivis eĉ multajn sensonĝajn noktojn por ĝustatempe ekspedi Starton, por prepari kongresojn, malgrandajn renkontiĝojn kaj ĉion, kio aptartenas al tiaj aranĝoj.

Ĉu ilia laboro povas esti forgesata? Ĉu okazas vere fino de nia aktiveco. Ĉu pasive alrigardi ĝin? Ĉu entute la ideo de la Internacia Lingvo povas esti forgesata?

Ni ĉiuj devas helpi por konservi li agadon de nia asocio. La solvon skizas novjaraj vortoj de nia prezidanto inĝ. Vlastimil Kočvara: „...La menciitaj eventoj naskos ŝanĝon de la agadstilo de nia asocio. Ŝajnas, ke en proksima tempo ne plu ni povos atendi, ke ĉiun endan laboron plenumos la sekretariejo, sed ĉiuj devoj disdividiĝos inter komitantanoj dise tra la respubliko, kaj niaj membroj, do, devos ofte kontaktiĝi rekte kun tiuj. La laborkapablo, entuziasmo kaj intereso mankas al neniu el la komitato. sed por ili kaj ankaŭ por vi venas malfacila jaro. Mi ja fidas al miaj kolegoj en la komitato kaj la komitato fidas al niaj membroj. Se ili forte apogos nin, ni venkos la neatenditajn malfacilaĵojn. Kaj nur en reciproka apogo povas nia asocio travivi la jaron 1994…“ Apogi vi povas nian asocion per mondonacoj, abono de Starto, kaj modela partopreno en la vivo de via loka klubo, kiu restas sola ligilo inter niaj anoj kaj nia asocio. Ni helpu per disvendo de stoko de gazetoj, libroj kaj partoprenu la somerajn tendarojn aŭ interŝanĝajn vizitojn, organizataj de Pasporto aŭ individuaj kluboj. Ni propagandu E-on kaj per propra inventemo serĉu la helpojn, pri kiu vi supozas savon. La plej oferemaj gesamideanoj eĉ donacis siajn „kuponajn libretojn“ aŭ partojn el ili. Skribu al ni viajn proponojn.